



ISSN 1886-1997

Kajeroj el la Sudo

La 30^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/hale/k100.html>

Kiam naskiĝis Hispanio?

Kie estas la oro de la Banko de Hispanio?

Jen la prezidento, kiun vi ne voĉdonis



Pri la 103^a UK

Trairante Afrikon

N^o 100^a

Julio 2018

Kajeroj**el la Sudo**

*Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).*

Enhavo **Calle Jabonerías, 6.3° D**
30010 Murcia
Hispanio

Redaktore: Cent kajeroj.....3

UK 103^a..... 4

Sukcesa librofoiro.....7

Trairante Afrikon.....8

Imperiofobio..... 10

La oro de Moskvo.....13

Prezidento..... 14

La peko de l' Taliban' ĉ 8^a ...19

ISSN 1886-1997 aŭ
1886-1938 (se printite)
Depósito legal: Z-2398-88

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**
Korektas: **Jozefo Pina.**
Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe,
ke oni citu la originon.**

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon,
kiun ni trovos interesa kaj kies enhavo
mistraktas neniu personon.**

Kovrilo: Fideluloj en Benin' donacas al siaj pastroj en preĝejo. Nia samideano Petro Rujs' vojaĝadas tra Afriko kaj sendas interesajn kaj fotojn kaj komentojn pri sia vojaĝo. Pli sur paĝo 8^a.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino. **Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.**

Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

**Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi
pagas. Poste, sendu noton al
kajeroj@gmail.com**

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Same kiel Esperanto, senpaga estas la ilaro, per kiu ĉi tiu bulteno estas farata: Ubuntu', LibreOffice, Gimp, Scribus, Bluefish kaj gFtp.



Redaktore **Cent kajeroj**

Leganto havas en siaj manoj la numeron 100^{an} de **Kajeroj el la Sudo**. Vere, la vojo estis longa kaj ne ĉiam estis komforte verki kaj reverki la artikolojn, kiujn vi, leganto, legis laŭ la jaroj. Sed jen ni.

Eble la fondintoj de la magazino, Antonio Marco Botella¹ kaj Miguel Fernández, ne antaŭvidis nian longan vivon, ĉefe pro tio, ke estis problemoj en la asocio, pro politikaj kialoj, kiuj kaŭzis, ke preskaŭ ĉiuj niaj samideanoj forlasis HALEn, kaj se estas miloj da legantoj de nia bulteno, tio estas nur pro tio, ke oni povas legi ĝin tute senpage el ĉiu lando el la mondo. Jes, ni memoru, ke ni estas laboristoj, sed **ne nepre ruĝaj**, aŭ eĉ maldekstraj. Laboristoj ja rajtas havi la politikajn inklinojn, kiujn ili preferas, kaj eĉ se tiuj maldekstraj ne komprenas, ke oni povas esti laboristo kaj ne maldekstra, tio tamen ne estu nekonvene ne aparteni al asocio kiel tiu nia, Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj. Espereble la centa numerveno ŝanĝigu la sintenon de esperantistoj kaj laboristoj, kaj denove ni amike venu kaj kunlaboru en klerigajn asocion



Antonio Marco Botella,
nia unua ĉefredaktoro

kaj bultenon.

De kiam la numero, kiun vi havas antaŭ viaj okuloj, leganto, devintus veni, kelkaj gravaj aferoj okazis en Hispanio kaj ekstere. Unue estis la 103^a Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono. Tie renkontiĝis multe da malnovaj amikoj, kvankam aliajn oni ne povis renkonti, ĉar ili jam forpasis, bedaŭrinde.

La alia afero grava estas la truka enekoficiĝo de la perdinto de la lasta balotado en Hispanio. Pri ambaŭ eventoj ni rakontas en niaj paĝoj.

Aldone, okazis Libra Foiro en Mursjo post kelkjara neapero. Mi partoprenis en budo MCRC.

De la komenco de la dua cento de nia numeraro, mi intencas, ke **Kajeroj el la Sudo** iĝu pli literatura kaj kleriga, kvankam en literaturo povas veni ĉiu kampo de homa penso, inkluzivante socialo kaj politiko, kiel ĝis nun formigis niajn numerojn. Fakte tiu ĉi numero devintus esti verkita en la latina, sed mankas klerigo al mi fari tion, kaj sekve ĝi aperas nun en miaj tri lingvoj.

Mi esperas, ke ni akurate prezentiĝos antaŭ vi, kaj ke vi komentos pri nia laboro, kiun vi komprenoble estas invitata partopreni kaj kunlabori, se vi emas tion fari.

¹Ĉinnumera koloro estu omaĝo al niaj iniciatintoj.

Movado

UK 103^a: *Lisbono malnova kaj sinjora*

Finfine venis la tagon, kiam nia 103^a Kongreso okazis. Ne malbone por tio, kion oni diras, ke Esperanto ne progresas! En ĉefurbo atlantika, kie ni ĝuis la varmajn veteron kaj kunesto de geamikoj esperantistaj, kiujn ni retrovis, eĉ se ne kelkajn, kiujn ne plu estas inter ni. Tamen, Esperanto progresas.

Kvankam mi jam konis la urbon, mi nur vizitis mallonge ĝin antaŭe. Sed mi konis de ĉiam la kanton de Amalja Rodriges *Lisboa Antigua*:

Lisboa, velha cidade,
Cheia de encanto e beleza!
Sempre a sorrir tão formosa,
E no vestir sempre airosa
O branco véu da saudade
Cobre o teu rosto linda princesa!

Lisbon', urbo malnova
Plena da ĉarmo kaj belo!
ĉiam ridetante tiom bela
kaj vestante ĉiam
eleganta.
Tiu vualo nostalgia
kovras vian princinan
vizaĝon!



Do la 27^{an} de julio amiko esperanta akompanis min al ĉefurbo portugala, kaj post longa pilgrimado tra la ega konstruaĵo flughavena ni venis en taksion, kiu portis nin al Hotelo sufiĉe luksa, sufiĉe malmultekosta. La venontan tagon ni lernis kiel uzi la lisbonan metroon, kaj estis ĉe la Kongresejo, la Fakultato pri Ĵuro. Ni eraris pri la lokiĝo de la akceptejo, sed ne sole ni, ĉar prezidanto de UEA ankaŭ legas sidante sur ŝtuparo, kiam ni alvenis. Subite oni avertis al li telefone, kaj li marŝis aliloken. Ni sekvis lin kaj baldaŭ ni triope estis en la vera akceptejo, tie, kie taksiisto dekomence celis lasi nin, ĝis kiam mi vidis longan flagon kun vorto **Esperanto**, kaj haltigis lin en la erara loko.

Unuafoje mi forgesis preni mian karteton kiel kongresanon, kaj oni devis serĉi min per mia identigilo, sed antaŭ oni sukcesis trovi min, mi petis de ĝentila samideano trovi la sekvantan kongresnumeron al tiu de mia amiko, ĉar ni aliĝis kune al la 103^a. Jam kun mia kongreskarto sur mi, komencis mi trovi gesamideanojn, kaj plendi pri neĉeesto de tiuj mankantaj. Ofte lastatempe ankaŭ mi mankis, kaj eble mankos venontjare kaj poste, sed estas plezure renkonti geamikojn, mi notas. Fakte, jen la plej konvena flanko de Universalaj Kongresoj de Esperanto. Oni ofte povas plendi, ke temas pri granda komerca afero fare de firmao UEA, sed vera esperantisto prifajfas la aferon, komprenante, ke tiu alporto de esperantistoj okazigas la eventon plej grava pri



Esperanto en la mondo, por ke oni vidu, ke Esperanto ekzistas, kaj ke ĝi profitas al ni; kaj aldone, ke estas ni tiumaniere ĉefroluloj pri tiu grava evento en la historio de homaro, kaj certe de nia movado esperanta. Ni partoprenu, se ni havas monon, kaj ne partoprenu, se ne havas ĝin, sed apogu tiun iniciaton sincere, kaj lernu pri ĝi pere de magazinoj, kiel **Kajeroj el la Sudo**. Evidente, partopreni kostas monon, sed vidu, ke ne nur amatorojn senpagajn, sed ankaŭ profesiulojn oni bezonas igi la aferon marŝi bone. Kaj tiujn lastajn oni devas pagi.

Universala Kongreso estas tro densa prirakonti detale ĉi tie, sed mi kunhavas al vi la personan impreson de kongresano, el tiuj kongreseroj, kiujn mi partoprenis. Kiel sciante, ofte okazas kelkaj eroj samtempe, eĉ sep, mi kalkulis; do oni devas elekti laŭ siaj preferoj. Fakte nur Internacia Foiro, kaj Nacia kaj Internacia Vesperoj estis solaj, sendependaj eventoj, por ke ĉiuj povas ĉeesti.

Pri tiu antaŭlasta, Nacia Vespere, mi povas diri, ke ne estis la plej brila, kiujn mi ĉeestis dum mia vivo kiel UKongresano. Fakte, mi unuafoje foriris antaŭ la fino. Diable, Ĉu en Portugalio ne estas alia vidinda artaĵo krom *Fado*? Sed almenaŭ tio estis respektema al ĉeestantaro, tamen. Ne tion oni mi povas diri pri la koncerto de homo konata kiel *Platano*: Mi forlasis la ejon, kiam mi aŭdis malagrablajn kantojn, kiel tiuj, per kiu li deziras *Fek' al Esperanto*. Oni povas esti memkritika sen forlasi respekton al si kaj ĉefe al tiuj, kiuj aŭskultas onin. Alimarĝene estis la koncerto de Jomo, ĉiam tiom respektema kaj amika, kiuj invitis nin veni en la scenejon danci kun li kaj ĝui la etoson familian kaj artan vekigita de liaj mirindaj kantoj kaj gitarludo. De-koj da geesperantistoj aliĝis al lia invito, kaj finis kun ŝvito kaj feliĉo pro tiu magia momento. De kelkaj kongresoj mi ne plu



Jomo koncertumas kaj dancigas nin




Miĥaelo parolas pri siaj libroj kaj diskoj.

partoprenas en la Internacia Koruso, eĉ se mi komprenas, ke estas privilegio kanti tie, sed mia voĉo perdis forton kun aĝo, kaj ankaŭ partopreno postulas perdi aliajn eventojn de la UK, kaj mi provas ĉiam ĉeesti plej eble kiel eble en la ceteraj eroj.

Kiel tiuj de Libroservo, en kies plej alta etaĝo diversaj verkistoj prezentis siajn librojn, kiel Miĥaelo Bronŝtejn faras en apuda foto. Li ankaŭ muzikis por ni en koncerto kune kun Sergeo la Terura, kaj de tiam mi ade aŭskultas ilin el kompakta disko, kiun mi aĉetis tie. Sed tiu vizito al Libroservo ne estis senpaga: tie mi ricevis

ŝokantan novaĵon el koverto de ĉi apuda libro: mia preskaŭ amiko kaj debatkunanto Joŝi Ŝemer mortis antaŭ ses jaroj, kaj mi tute ne sciis. Jes, devis esti pro tiu kialo, ke ĉesis veni tiom konstanta kongresano... Ni omaĝu lin kaj aliajn homojn, kiujn ni konis en niaj UK, kaj ili jam foriris el nia kunesto..., per aĉeto ĉe UEA de ĉi tiu zorge kolektitaj detaloj pri nia samideano en tiun libron.



Estas neeble rakonti ĉion, sed mi ne volas ne mencii la fakajn kunvenojn, kiel tiun ĉi-suban, tiun de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo, gvidata de Dieter Rook; aŭ tiuj de ATEO, aŭ MEL, en kies kunesto mi tiom agrable pasigis la tempon kaj, fojfoje, mi alportis kelkajn ideojn.



Interesa komunisma kunveno, gvidata de Dieter Rook'

Kulturo

Sukcesa librofoiro en Mursjo

De la 21^a ĝis la 23^a de septembro okazis libra foiro en Mursjo, dek jarojn post la lasta. Ĉi tiu estis la 16^a, kaj esperantistoj ne havis budon, sed mi kunlaboris kun Eldonejo MCRC. Tio estas akronimo de Movo Civitana por Respubliko Konstitucia, do en Esperanto MCRK.

La rilato de tiu budo, nombro 11^a, kaj de la foiro mem, al Esperanto, estas vere mí.

En apuda foto oni vidas MCRCanon Germán Beteta, kaj mi montrante ĉefverkon de Antonio García-Trevijano Forté, **Teorio Pura de Demokratio**, kiun mi konsilas vin legi, kaj pri kiu mi prezentos recenzon en ĉi tiuj paĝoj en numero 101^a, kaj noveleto mian, **¡Viva la República**, kiun vi jam legis ĉi tie.

Tiu verkisto, mortinta la lastan 28^{an} de februaro, defendas per siaj verkoj, ke en Hispanio, kaj ankaŭ en la cetera Eŭropo, ne ekzistas demokratio, sed oni povus starigi ĝin, se oni sukcesus krei kaj adopti vere demokratian konstitucion. El liaj libroj mi prenis la ideojn, kiujn mi defendas en miaj artikoloj politikaj ĉi tie, ĉar ili estas logikaj.

Preterpasantoj interese demandis nin pri niaj libroj, scivolemaj pri afiŝo, kiu estas sur dekstra muro en nia budo, dirante citaĵon de Platon': *Prifajfi politikon kostas, ke regu nin la plej malbonuloj.* Kaj niaj kvar demandoj: 1 *Kial ni havas prezidenton, kiun ni ne elektis?* 2 *Kio estas la origino de korupteco?* 3 *Kiel via politika reprezentanto nomiĝas?* kaj 4 *Kio estas kolektiva libereco?* Kaj ĉefdemando: **Ĉu vi havas respondojn al tiuj ĉi demandoj?**



Enkonduko.

HALeano Pedro Ruiz nun vojaĝas tra Afriko. Li sendas al ni siajn komentojn pri tiu mirinda kontinento. Sed ni lasu lin mem rakonti al ni:

Meso.

Hodiaŭ ceestis mi meson en katedralo katolika de Paraku'. Ĉeestantoj vestas plej eble kiel bele. La kuncelebrantoj estas 13, ja ili parolas sinsekve la francan kaj la anglan, ĉar estas multaj angloparolantoj veninte el Niĝerio. Homilion diras ĉefa preĝisto, kvazaŭ aktoro, kiu moviĝas laŭ la antaŭaltaro kaj eĉ koridoroj, varmigante la ĉeestantaron, kiu respondas histerie al liaj demandoj per tiuj aferoj, kiujn li esperas. Mi citas kelkajn vortojn de li: *Mi scias, ke vi venis kun pli ol mil frankoj en viaj poŝoj, sed ni supozu, ke vi nur 1000 portas: kiom vi donos al Di'? Ĉu cent? Ĉu ducent? Ĉu 500?* Tiam infanoj en la unua benko diras: *Kvincent!* Rapide la preĝisto invitas ĉiujn donaci almenaŭ 500, ĉar geinfanoj diris tion. Estas orĥestro kaj koruso, kiu kantas kanzonojn, kiujn ĉiuj konas kaj kantas dum homo venas laŭ la centra koridoro alveni al la pupitroj kaj lasi la monon laŭte kaj parade. Poste oni aŭkcias glason da minerala akvo. La orĥestro kuraĝigas pliproponi pere de tamburado. Ĉiu persono, kiu aldonis monon al propono venas laŭ la koridoro kun bileto en levita mano, dum spektantoj enfebrigitaj aplaŭdas. Ili atingas la ciferon 259 725 frankojn. Poste, la ĉefa preĝisto vokas tri ĉefulojn, kiuj donis plej kvanto da mono, kaj ofertas al ili trinki el la glaso da akvo. La ceteron de la glaso li verŝas en du sitelojn kaj du preĝistoj per du balailetoj trairas la koridoron akvumante la ĉeestantojn. Post tio, la



pia societo *Sankta Jozefo* trairas la centran koridoron ĝis la altaro portante kokinojn, manĝaĵojn, trinkaĵojn, kaj aliajn objektojn. Societo de virinoj faris same, kaj ankaŭ kelkaj familioj kaj grupoj. Poste mi vidas virinon prenante poŝtelefono, kaj kontraŭante tiu regulon, ke estas malpermesite uzi ĝin en la katedralo, mi kuraĝas



preni tiun mian kaj foti. Post meso finiĝas, ĉiuj venas en la korton katedralan kaj starigas feston per muziko, manĝado kaj trinkado. Ankaŭ oni starigas tombolon pri ĉiuj oferoj.

TOGO

Mi venas en la landlimon kun Togo. Tiu apuda fotego pri Afriko



estas la sola foto, kiun oni permesis al mi fari en la landlimo. Policanoj, aldone, diris al mi, ke mia multtienira vizo, kiun mi ricevis en Benin' iri kaj reveni en la du landojn, ne validas en Togo, kaj ili devigis min pagi novan vizon. Togolano ĉeestanta diris al mi poste: *Tiun monon, kiun vi ĵus pagis, ne iras al ŝtato, sed al poŝoj de tiuj policanoj, kiuj dividos ĝin inter si.* Mi ankaŭ konstatis, ke multaj vojaĝantoj ne havas identigilon, sed ili donacas monon al policanoj esti permesataj eniri kaj eliri tra la limo.

Taksioj kolektivaj trairas la limon sen plenumi ian ajn formalajn kaj venas en la unuan urbeton togan, kie ili disvendas la vojaĝantojn al togaj taksioj por atingi la celon interkonsentita en Benin'.

Daŭrigota


Senkomplekse oni ricevu la heredaĵon de niaj antaŭuloj: *Historio* **Imperifobio kaj nigra legendo.**

Aŭskultante homon, facile estas scii kie li ekvidis sunlumon se li laŭdas Anglujon, li estas anglo se li rifuzas Prusion, li estas franco, kaj se li fiparolas pri Hispanio..., li hispano estas.

Oyendo hablar un hombre, fácil es saber dónde vio la luz del sol
 Si alaba Inglaterra, será inglés
 si reniega de Prusia, es un francés
 y si habla mal de España...
 es español.

Supra poemeto venis el la plumo de poeto Johakim' Bartrina, hispano de Barcelono de 1850 al 1880. Mi konis ĝin per novelo de Fernando Sánchez Dragó, kies titolo estis ekzakte tio: **Kaj se li fiparolas pri Hispanio, li estas hispano** (2007), kiun ni recenzos estonte. Sed mi mencias ambaŭ, kaj poemon kaj novelon, ĉar nekredible la *Nigra Legendo* havas pli da kredantoj en Hispanio ol ekster nia lando. Ĝi komencis en Italio, kiam la Imperio Hispana regis tie, kaj daŭrigis ĝin poste angloj kaj nederlandanoj, pri sia timo al la sola Imperio en la mondo sub la regadoj de Karlo 1^a kaj Filipo 2^a.

Estas sufiĉe riveliga, ke hodiaŭ estas en Hispanio disvastigata opinio, ke ĉio eksterlanda estas pli bona, ol tio, kion ni havas. Oni alte taksas Eŭropon, eĉ se nenio bona venis el ĝi al ni. Kiam mi vidas tiujn artikolojn en ĵurnaloj, kaj ankaŭ opiniojn en socialaj retoj, kulpigante hispanojn pri genocido en nuna Sudameriko je la tempo de ties konkero, kaj ankaŭ pri fiagoj de Karlo 1^a, Filipo la 2^a kaj aliaj hispanaj regantoj laŭ la tuta historio, mi ne povas ne kompati la profundan ignorantecon de tiuj homoj, kio estas tute nepardonebla en homoj naskiĝintaj kaj edukiĝintaj en Hispanio, kaj eĉ en la diversaj landoj de Sudameriko. Eble tiuj homoj ne scias, aŭ eĉ mensoge silentas, ke en Britio katolikoj ne havis tutajn civitanajn rajtojn ĝis dua parto de la 20^a jarcento, dum en la tuta hispana konkerita lando de Ameriko (el Alasko ĝis Tero de l' Fajro, en suda



Argentinio), indianoj havis samajn rajtojn kiel tiuj kastilanoj naskiĝintaj en Kastilio. Fakte indianoj perdis tiujn rajtojn kiam ili ĉesis esti hispanoj, tuj post sendependiĝo aŭ la invado de Usono en ties lando kiel sekvo de militoj kun Meksikio kaj ankaŭ pro paktoj inter nacioj. Jes, estis genocido en Ameriko, kaj tutajn rasojn oni ekstermis, sed ne hispanoj faris tion, sed britoj, francoj kaj, plejvaste, usonanoj.

Fakte hispanoj neniam havis **koloniojn** en Ameriko aŭ ie ajn en la mondo, sed **provincojn** kaj **vicregnojn**, kies kapoj respondecis rekte antaŭ la Reĝo. Nekonataj en la nehispanaj konkeroj estis la devigaj institucioj **Konsilantaro pri Indioj**, kaj **Juĝo de Rezidejo**. Tiu lasta devigis ĵuseksoficigitan registon ne forlasi sian urbon ĝis finis sia juĝo nome de la Reĝo pri ĉio, kion oni povus akuzi lin pri tio, kion li faris aŭ misfaris dum sia regado. Kelkajn oni enkarcerigis pro siaj troigoj (eĉ la malkovrinto mem, Kristoforo Kolombo, estis venigita en la korton de la Katolikaj Gereĝoj katenigita pro tio), eĉ se plejmulto da ili estis deklaritaj senkulpaj, pro tio, ke ili faris aferojn kadre de leĝo kaj *kristanaj virtoj*. Ni pensu pri tio, kio povintus okazi, ĉu francaj kaj anglaj registroj de siaj kolonioj havus tiun juĝon... Tiom da paktoj kun indianoj perfiditaj de blankuloj, tiom da genocido kaj senjustaj militoj antaŭ unu-du jarcentoj en la grundo de nuna Usono pro avido de blankuloj. Eĉ starigo de rezervejo por indiano estas eksiliigo en sia propra lando, grava honto kaj perforto de homaj rajtoj. Tio neniam okazis en hispana Ameriko.

La alia institucio, kiun mi menciis unue, **Konsilantaro pri Indioj**, zorgis, ke en la Nova Kontinento la justeco de la Reĝo estas plenumata same kiel en ĉefa Hispanio. Inter la unuaj universitatoj de Hispanio rangas tiuj de la ĉefurboj de Santo Domingo, Peruo kaj Meksiko, je la 16^a jarcento, kio igas ilin la unuaj el la tuta kontinento. Aldone, kelkaj indiĝenoj amerikaj iĝis grafoj kaj alispecaj nobeluloj, kio estis neniam atingata en la nehispana Ameriko. Ne tion sukcesis havi Simon' Bolivar', kaj de tie, oni diras, venis lia malamo al Hispanio.

Kiam venis sendependeco, profitante la sendefendon de la tuta Hispanio pro la perfido de invadanta napoleona Francio, estis profunda regreso en tiu teritorio. Indianoj perdis siajn rajtojn, kaj okazis genocido pri ili en kelkaj partoj de la lando. Komencis baldaŭ militoj inter kelkaj novaj ŝtatoj, kiuj ĝuis pacon dum pli ol tricent jaroj, tiuj de la hispana regado. Laŭ publika konfeso de Liberiginto Simon' Bolivar, *Ni atingis sendependecon koste al ĉio alia*.

Tiujn ideojn de mi prezentataj al vi per ĉi tiu artikolo oni povas legi kaj kontroli en la mirinda libro de Elvira Roca Brea ***Imperifobio kaj nigra legendo***, kiu aperis antaŭ kelkaj monatoj. Oni povas trovi ĝin en ĉiu librovendejo, sed ankaŭ ĉe Amazon (<https://www.amazon.es/dp/B01M4L8IHE>). Estas veroj, iuj dolorigas, kaj tiu libro premas la vundon de envio kaj falseco per kiuj oni inventis la *Nigran Legendon*

Hispanan, pruvante aferojn ĝis nun tiom neeksplikeblajn, kiel tion, kiel Fansisko Pisaro sukcesis konkeri pere de nur 284 soldatoj teritorion kvaroble pli grandan ol tiutempa Hispanio.

Certe, imperiofobio ekzistas multe pli frue ol Hispanio: oni iam timis kaj malamis Romian Imperion, kaj poste ankaŭ Britan kaj Usonan, ne menciis Islaman en Mezepoko. Sed dum en Anglio en la nuna tempo oni trovas multe da homoj, kiuj fanfaronas pri sia Imperio Brita, en Hispanio preskaŭ neniu kuraĝas paroli pri la Imperio Hispana. Tio estas ĉar ĝis nun hispanoj kredis la mensogojn verŝitajn en tiun legendon, pro ignoranteco kaj minuskomplekso, dum aliaj landoj, kiel Anglujo, Francio, Turkio, kaj tiel plu, havas multe pli por silenti. Kie estas la milionoj da indianoj, kiuj vivis en la teritorio de nuna Usono? Ni memoru tiun diraĵon plenplene akceptita tie: *La plej bona indiano estas tiu mortinta*. Kaj kie estas la indianoj, kiuj vivas en tiama Ameriko Hispana? Certe en Sudameriko nuna. Ĉar hispanoj ja edziĝis al indianinoj, kiel Elvira Roca pravas per sia libro, pro ordono de la Reĝino Isabel' de Kastilio mem. Mi ne povas imagi britan monarĥon dirante tion... Hispanio kopiis sin mem en kokeratan landon, male al tio, kion aliaj faris, kiu nur ĉantaĝpirabis pere de siaj plipovaj armiloj.

Pro tio, kaj aliaj detaloj, kiujn oni povas legi tie, la libro de Elvira Roca Brea devus esti legata de ĉiu hispano, se li aŭ ŝi deziras scii pri tio, kio estas nia heredaĵo kultura, kaj per tiu kono kaj tiu venante el aliaj libroj, kiujn ŝi referencas en sia abunda bibliografio, ebligi nin defendi ĝin tie, kie necesu. Iam laŭ la tuta Eŭropo oni tremis, kiam la Hispanaj Legioj movas. Hodiaŭ Eŭropo primokas Hispanion kaj hispanojn la tutan tempon. Ĉar ni estas ignorantoj pri nia propra historio. Defendi ĝin postulas koni ĝin. Libroj kiel tiu ĉi estas nemalhaveblaj en niaj bibliotekoj. Mi elkore rekomendas la legadon de tiu ĉi libro, kaj dankas ties aŭtorinon pro la sciigo pri gravaj demandoj, kiujn mi faris al mi mem delonge. Ekzemple, kial la angloj ne sendis floton puni la atakon de la tiel nomita *Nevenkebala Mararmeo*. Respondo estas, ke ili ja sendis sian mararmeon..., kiu estis venkita fronte al Galegio. Kaj, aldone, ili malvenkis tiun militon, kvankam tion silentas la fieraj posedantoj de Placo Trafalgar' pro honto, kaj hispanoj, pro ignoranteco.



Pisaro kaj Almagro starigis la unuan Civilmiliton en Hispanio sur la grundo de nuna Peruo.

La oro de Moskvo

Mi ne komprenas, ke popolo forgesas pri sia plej granda havaĵo favore al ideologio vundanta de minoritato. Hispanio ne estas ruĝa, kaj tion oni scias, ĉar je 1936 popolo apogis generalojn, kiuj puĉis kontraŭ bolŝevisma diktatoreco, kiu ekestiĝis pro malakcepto de rezulto de voĉdono je 1934.

Bonecon de komunisma paradizo oni komencis suferi pro malaperigo de civitanoj, kiuj ne kongruis kun komunisma doktrino. Eĉ generalo Fransisko Franko admonis siajn kamaradojn militistajn kontraŭ puĉo, ĝis kiam okazis grava murdo, tiu de Gvidanto de Opozicio Parlamenta, Jozefo Kalvo Sotelo, kiun fakte oni minacis en la parlamento mem. Tiu murdo estis turnopunkto, ĉar oni sciis baldaŭ, ke unu el la murdistoj estis ano de socialisma partio PSOE, kiun nek la partio nek la registaro punis. General' Franko tiam konvinkiĝis pri tio, ke estas pli danĝere ne ribeli ol ribeli, kaj la 14^{an} de julio li komunikis al puĉistoj, Generaloj Emiljo Mola, Jozefo Sanĥurĥo, Gonzalo Kejpo de Ljano, Manvel' Goded', Johakimo Fanĥul' kaj la tiama kapo de la puĉo, Migel' Kabaneljas, ke li aliĝas al la puĉo pro la danĝera situacio de la patrio.



José
Calvo
Sotelo

Lenin' diris, ke mensogo dirita milionon da fojoj iĝas vero, sed li eraris, ĉar vero ĉiam trovas vojon al kono de tiuj, kiuj senantaŭjuĝe serĉas ĝin. Hodiaŭ verkistoj neŭtralaj, kiel usona Stanli Pejn' asertas, ke tia estis la situacio tiama. Do, eĉ se la nuna registaro de Hispanio intencas leĝigi pri silento historia, ili ne sukcesos, ĉar vero ne plu estas nur hispana, sed jam radikiĝis preter la landolimoj de Hispanio, kaj vere tiu ĉi registaro riskas ridindigi sin eĉ plie ol tiu de Zapatero, kies leĝoj solvis nenian problemon de hispanoj, sed aldonis novajn, inter ili la preskaŭ bankroton de la nacio, kaj se ni ne plu povas rangi inter la plej riĉaj landoj el la mondo, kialo estas en fiaj agoj de memdirita maldekstro.

Jes, ĉar prezidanto kaj ministro popolfrota, Negrin', sendis la oron de la Banko de Hispanio en Sovetunion, celante, ke Franko ne ĝuu tion, forgesante, ke tiu oro apartenis nek al Franko nek al Popolfroto, sed al Hispanio, sendepende de kiu regos ĝin. Oni kalkulas, ke estis kvincent mil kilogramoj da oro la kvanto, kiun popolfrota registaro sendis al Sovetunio per la haveno de Alikanto. La Intercivitana Milito finis je 1939, la rabo de la oro hispana okazis je 1936, du monatojn post ties komenco. Oni eltiru siajn proprajn konkludojn. PSOE ŝuldas oron al ni.

Prezidento

Ja tedas min la nocio milfoje ripetata en paĝoj de interreto, ke *hispanaj naciistoj invadas kaj humiligas la ceterajn naciojn de Hispanio*. Nu, la realo estas, ke en Hispanio ekzistas **nur unu nacio**, kaj eĉ se senkuraĝaj politikistoj je 1978 cedis al premoj de regionistoj pri inkluzivo de la vortoj **nación** kaj **nacionalidad** kun malsamaj tamen similaj signifoj (fakte *nacio* kaj *nacieco*, kio estas sama radiko), de la jarcento 6^a en Hispanio ekzistis nur unu nacio, kiu transformiĝis iom post iom laŭ historiaj kaj sociaj eventoj, sed neniam ekzistis *provincaj* nacioj, eĉ se ekzistis diversaj reĝolandoj sur la nuna grundo de Hispanio.



Jen la unua reĝo de Hispanio

Estus tede ripeti ĉi tie lecionon pri historio de la lando, sed resumo estas, ke ne ekzistas hispana naciismo, sed **hispana nacieco**, kaj ne ekzistas **vaska** aŭ **kataluna** nacioj, sed tiaj **naciismoj**. Kaj kio estas diferenco? Nu, naciistoj deziras krei apartajn ŝtatojn por poste krei sian proprajn naciojn, forpuŝante nenaciistojn el ties hejmo. La hispanan nacion kreis la visigota ŝtato antaŭ dekkvin jarcentoj, kaj nun estas perfiduloj, kiuj neas sian propran naciecon por krei novan, pensante, ke tiel ili estos pli liberaj kaj vivos pli bone. Ili estas ignorantoj, ĉar ili devus scii pri la historio de sia propra nacio: Hispanio ekekestis kiel nacio nur kiam visigotoj sendependigis ĝin el Romio perforte, je la jaro 507. Ili estis malgranda popolo, kiu baldaŭ kunfandiĝis kun la romikultura popolo, kiu delonge loĝas en la loko, kiun ili konkeris. Ili **adoptis** la **lingvon** kaj **kulturon** de la konkerita lando, kaj post kelkaj jardekoj ankaŭ ties **religion**, kio estis la faktoro, kiu unuigis la tutan landon. Religio unuigis la popolon dum la longa invado de islamanoj, kaj fakte tio, kune kun lingvo kaj aliaj malpli gravaj kulturaĵoj, malpermesis, ke la hispana nacio pereis sub la islama katastrofo, malsame al tio, kio okazis en aliaj landoj, kiel Egipto aŭ Turkio. Gluitaj de kristana religio, la diversaj regnoj de Hispanio supervivis kaj sukcesis forpreni la islamanojn el nia tero,

kaj tuj post ĝi hispanoj konkeris tutan kontinenton, kaj tion farante rekreis Hispanion kaj, iom poste, inventis Amerikon.

Kaj nun venas prezidento, kiun la popolo neniam antaŭe akceptis, ĉar oni voĉdonis lian deputitliston malpleje en la historio de lia partio kadre de la tiel nomita demokratio hispana, kaj pere de sekretaj paktoj kun aliaj partioj minoritataj, forprenis la plejvoĉdonitan registaron kaj kreis novan, kiu ankaŭ ne solvos niajn problemojn, sed kreas novajn, same kiel Rodrigues Sapatro faris antaŭe. Nun ŝajnas, ke la plej grava afero estas eltombigi Diktatoron Fransiskon Frankon, anstataŭ malpliigi sendungecon, malpliigi la nacian ŝuldon, aŭ negoci rabaton, same kiel Grekio faris (ili sukcesis havi 70%an rabaton!), malaperigi koruptecon je ĉiu tavolo de la Hispana Ŝtato, pliigi la ekzemplodonon de aŭtoritatuloj en la registaro, kaj tiel plu... Jes, mi konsentas, ke la heredaĵo, kiun li prenis el registaro de Marjano Raĥoj ne estas tre kontentiga, ĉar interalie li ricevis rompiĝotan ŝtatlandon, eĉ se ni estus maljustaj, se ni ne memoru, ke tia heredaĵo lamas jam el oficoj de ĉiuj antaŭuloj liaj en la prezidenteco de Hispanio, kiuj cedis tion, kio neniam estis sia, tio estas, parto de Hispana Suvereneco, kiel kompetento pri edukado kaj polico, al naciistoj regionaj ŝanĝe de apogo parlamenta. Do gravis multe pli al ili regi ol favori

la popolan aŭ la landon. Jen pruvo pri tio, ke ili prifajfas pri la bono de la popolo, sed ili nur agas favore al siaj ideologioj (ĉu vere pluralon mi bezonas ĉi tie?)

La elekto de Sánchez eblis



Prezidento Sánchez

pro voĉdonoj de PODEMOS kaj de sendependismaj partioj, kiuj eĉ se ili havas malmultajn deputitojn en nia parlamento, kun kune ili havas pli da voĉdonoj ol Popola Partio, kiu restis sola, kiel kutime. Ĝi sukcesis formi registaron, kiam ili havis pli ol 176 deputitoj, kaj ankaŭ kiam naciistoj helpis ilin per siaj voĉdonoj en parlamento. Tamen, ili neniam donacis tiajn favorojn sindone. Jordi Puĵol, iama gvidanto sendependisma, igis Prezidenton Aznaron ĉesi kontroli la edukadon en Katalunio, kaj post dudek jaroj jam estas sufiĉe da

junuloj, kiuj kredas la mensogojn, per kiuj naciismaj instruistoj provizis al ili, ĉefe tiun, ke fiaj hispanoj konkeris sangoverŝe la amatan patrolandon Katalunion, kaj endas nun forpeli ilin de sia sankta grundo. Bedaŭrinde por tiuj naciistoj, kaj katalunaj kaj vaskaj, **neniu** el ties **patrolandoj** estis iam ajn **sendependa**, kaj sekve ili daŭre devas mensogi cele al postulo pri sia sendependeco, ĉar siajn naciojn ili penas krei nun, ĉar ili ĉiam estis kastila aŭ aragona teritorioj en la istempo. Fakte, en modernaj tempoj, **nur Mursjo estis sendependa nacio**, eĉ se tio daŭris nur ses monatojn, de julio 1873 al januaro de 1874. Jes, se oni subfosas en la historion de Hispanio kaj Mursjo, tio estas, legas la ĵurnalojn de tiu tempo, oni trovas pri la fama ribelo duonjaraĝa. Dum tiu tempo ili eĉ deklaris militojn kontraŭ Hispanio kaj Germanio, kaj petis de Usono iĝi la 51^a tia ŝtato dudek ses jarojn antaŭ la Milito de Kubo! Bedaŭrinde Generalo Martínez Campos atingis la sedependan landon antaŭ Prezidento usona Grant' decidis kion fari, kaj la sendependeco de Mursjo finis kaj ties sendependistoj forfuĝis eksterlanden, same kiel Puĉdemont', ĉar ili estis mortkondamnitaj.



Antonete Gálvez, liberiĝis Murcion je 1873

Sed mursjanoj hodiaŭaj prifajfas pri tiu anekdoto (sango-verŝinta anekdoto, tamen, ĉar ili militis kaj konkeris kelkajn urbojn proksimajn hispanajn, kiel Hellín kaj Orivelo, kaj homoj bedaŭrinde mortis), kaj neniu en sia sana menso eĉ pensus peti sendependecon de Hispanio nome de tiu ero de historio kiel *historia aŭtonomio* aŭ teritorio.

Sed naciistoj ade mensogas, ĉar ili diras, ke estas Grafo de Barcelono, forgesante, ke tiu, kiu nun havas tiun titolon estas Reĝo Filipo 6^a de Hispanio.

Bedaŭrinde, la nova prezidento ne povas multe fari, ĉar li ŝuldas sian postenon al naciistoj, inter aliaj.

Sed sufiĉe mi jam diris estinte pri la afero. Gravas nun, ke ni hispanoj akceptis trukan leĝon, kaj poste sanktigis ĝin pere de sentaŭga nomo, Konstitucio. Vere neniu klarigis al ni, ignoranta kaj naiva popolo, pri tio: Kio estas Konstitucio? Laŭ artikolo 16^a de sufiĉe agnoskata deklario laŭ la tuta mondo civiliza, la ***Deklaracio pri Rajtoj de Homo kaj Civitano***, proklamita je 1789 en Parizo, *Ĉiu socio, en kiu ne estas garantio pri tio, ke estas certigataj rajtoj, kaj ke disiĝo de povoj ne estas*

determinitaj, ne havas Konstitucion. Pro tio oni povas pridiri tiun leĝon de 1978 kiel **Carton Magnan**, aŭ ion ajn, sed **ne Konstitucion**. Aldone, ĉe artikolo 66^a oni legas, ke La Reĝo de Hispanio nomumas Prezidento de la Registaro tiun homon, kiun Parlamento decidis, kaj tio certigas ke tiu nomo, *Konstitucio*, estas nur kroma. Se leĝofarantoj elektas registaron, kie estas disiĝo pri povoj?

Aldone ni rimarku, ke hispanoj voĉdonas ne homojn, sed listojn de nomoj de homoj. Gvidantoj de partioj politikaj elektas tiujn, kiuj estas en tiuj listoj, tiel, ke civitanoj ne povas elekti ilin rekte. Tio estas postulo pri fido al tiuj gvidantoj, pri tio ke ili elektos la plej taŭgajn homojn por la laboro. Bedaŭrinde tio ne okazis dum kvardek jaroj, kaj multaj elektitoj mensogas kaj troigas sian povon, kiam ili povas. Senpune, ĉar tiu kvazaŭ konstitucio diras, ke puni ilin necesas havi tribunalon, parton de kies juĝistoj nomumis la parlamento mem.

Ĉu la popolo, tio estas ni, eblas sendungi ilin? Ne, certe ne, pro la simpla kialo, ke ni ne elektis ilin, sed gvidanto el ilia partio decidis kiu estas voĉdonebla, kiu ne. El tio oni povas eltiri, ke jes, ni ne elektis Prezidenton Sanĉeson, tamen **ankaŭ ne Raĥojon, Zapateron, Aznaron, Gonzaleson eĉ Suarezon mem**. Do, kial protesti

nun, pri tio, ke neniu elektis Sanĉeson? **Vi neniam, naivuloj elektis prezidenton de Hispanio en via tuta historio!** Kaj vi sciu, ke kaŭzo estas, ke **vi ne estas demokrataj, kaj neniam defendis demokration**. Kaj pro tio vi neniam havos ĝin, ĉar havi demokration en lando postulas, ke oni laboru cele al ties starigo, kaj poste ĉiun tagon konservi ĝin, ĉar neniu donacas tion al vi.

La lasta frankisma registaro **donacis** al ni individuan liberecon, sed ne kolektivan. **Kolektiva libereco** ne eltenas, ke oni starigu referendumon voĉdoni pri konstitucio, kiun oni ne faris nome de la popolo. Ĉar tio signifas, ke popolo elektos deputitojn en listo, kien ĉiu homo rajtos eniri pro sia individua decido. Tiuj deputitoj havos nur unu taskon: verki konstitucion, kiun la popolon poste referendume voĉdonos, kaj se sufiĉe granda proporcio de popolo aprobas ĝin, ĝi ja estos **Nia Konstitucio**. Sed tiu tago ankoraŭ ne venos en Hispanion, ĉar plej granda parto de popolo kredas, ke ni jam havas Konstitucion!

Dume ni suferos prezidentojn kiel tiujn ses, kiuj venigis landon kun 0% da maldungo kaj 8^a posteno inter la plej riĉaj landoj en la mondo en riskon de bankroto. Sed ni, hispanoj, voĉdonis kaj ade voĉdonas al tio, nia ruinigo.

Kaj ade politikistoj kiel tiuj ĉi

nunaj daŭre ridaĉos al vi ĉiuj, ĉiun fojon, kiam vi iras voĉdoni, pro tio, ke *endas defendi demokration...* Kvazaŭ oni scias en Hispanio kio estas demokratio aŭ defendo.



La peko de l' taliban'**Tria parto: Rejin'****7 La defendanto.**

Subite pejzaĝo ŝanĝis. Li ne plu troviĝas en la domo de la imamo. Pro El Fu ne plu estas. Li vidas konatan lokon en ĉirkaŭaĵoj de sia urbo. Estas olivarbo kiun preterpasas tre bela knabino, dece vestita. Li konas ŝin. Li vidas, ke temas pri Rejin'. Li venas al ŝi, sed antaŭ ŝi vidis lin, knabo parolas al ŝi. Rejin' volas turni for, sed li kaptis ŝin kaj du aliaj viroj venas al ili: dum du el ili senmovigas ŝin, la tria suprenirigas ŝian vestaĵon. Sed li ricevis ŝtonfrapon je flanko de lia kapo.

«Vi lasu ŝin, satanidoj!», Abdul' Saleh' laŭte krias.

«Vi estas unu, kaj ni estas tri».

«Dio kaj mi povas pli ol vi tri», li diris saltante sur unun el ili kaj puŝante lin sur la grundon, tuj antaŭ li kovras lin per pugnobatoj. Se la aliaj du tenas lin je liaj brakoj kaj kruroj dum la tria viro frapas lin per granda ŝtono multfoje, ĝis kiam li perdas konscion.

«Murdistoj!», krias Rejin', «Vi murdis lin!»

La tri viroj konsciiĝas subite pri tio, kion ili ĵus faris, kaj forkuras. Rejin' restis kun li kaj kovris lin per kisoj. Poste ŝi vidis, ke li ankoraŭ spiras, kaj iom da tempo poste li rekonscias, eĉ se li estas tre malforta. Ŝi helpas lin stari kaj, apogante sin sur ŝi, li povas veni en la domon de urbokuracisto. Li metas malsekan tualon sur liaj vundoj kaj helpas lin veni en la domon de lia patro. Zulem' venas tre nervoza, kaj tuj post la junulo kuŝas komforte ĉe lito sia, Rejin' kaj la kuracisto iras vidi



Olivarbo de perforto.

juĝiston, kiu sendas policanon aresti la tri junulojn. La doktoro asertas, ke la malsanulo fartos bone post semajna ripozado, kaj pro tio la juĝisto decidas lasi la juĝon por tiu tempo, kaj dume li sendis la tri fiagintojn al malliberejo por ke ili pripensu sian fian agon.

Rejin' vizitas sian defendinton ĉiun tagon, kaj dum li resaniĝas, li instruas ŝin pri la saĝo de *La Libro*. Li diris al ŝi pri la neceso vesti kaj marŝi kun modesteco, kaj li eĉ konsilas al ŝi, ke ŝi petu permeson al sia patro vesti burkon. Sed la bona homo rifuzis:

«Se li volas, ke vi uzu burkon», li diris, «li povas edziĝi al vi kaj li ordonu tion al vi».

Kiam Abdul' Saleh' sciis pri tio, li konsultis sian patrinon:

«Panjo, plaĉus al mi edziĝi al Rejin'. Ĉu vi opinias, ke ni povos konvinki paĉjon peti ŝian manon?»

Zulem' miris multe al tio, ke ŝia filo volas formi familion kun bona knabino, ĉar ĉiuj kredis, ke li estis dediĉonte vivon pian observante leĝon de Dio, eble kiel derviĉo, fakiro aŭ imamo. Ŝi kuris en la vendejon de sia edzo rakonti al li, kaj poste ili komunikis al filo, ke tuj kiam li estos sana, ili petos la manon de Rejin' al ties gepatroj.

Kiam li estis sana, la juĝo okazis. La kulpatoj defendis, ke Rejin' inicitis ilin al peko, sed la juĝisto kredis pli la ateston de Abdul' Saleh', pia homo, kiu asertis, ke la konduto de la knabino estis pia dum la tuta evento, kaj ili tri intencis perforti ŝin pro fio. La juĝisto kondamnis ilin al pendumilo pro intenco de perforto kaj murdo. Sed Abdul' Saleh' petis de la juĝisto, ke anstataŭ pendigi ilin, enlandigu ilin al fora loko por ke ili neniam plu revenos, sub forkopuno, ĉar tiumaniere filinoj de Dio estos liberaj el ilia fienco. La patrinoj de la tri knaboj feliĉiĝis kiam, je la demando de la juĝisto, Rejin' diris, ke Dio estas kompatema, kaj ke ŝi sentos sin pli bone, se ili ne mortos, ĉar morto ĉiam estas malbono. Sekve, la tri junuloj estis prenitaj ĝis tri urboj for kaj avertitaj, ke se ili iam estos al sia urbo pli proksime ol ili estas nun, oni pendigos ilin aŭtomate.

La venintan tagon Ibrahim' kaj Zulem' vizitis la patron de Rejin' por peti ŝian manon. Kaj unu monaton poste ili geedziĝos.

Abdul' Saleh' nun helpas sian patron en negoco, kaj forlasis la mistikan vivon, kiun li kulturis de multe da jaroj. Li jam estis dudekvin jaraĝa, kaj nun jam estas tempo havi familion. La patro de Rejin' notigis, ke li konsideris, ke la gefianĉeco estis tro mallonga, sed Abdul' Saleh' garantiis al li, ke lia filino estos la plej pia virino en la urbo kaj ke li zorgos pri ŝi dum li vivos.

La nupto daŭris tri tagojn, kaj gasto aparta estis la plej riĉa viro el la urbo, S-ro Aben' Abdala'.

«Ni ne bone konas unu la alian, Abdul' Saleh', kaj eĉ se via patro kaj mi havis komunajn negocojn en la estinto, ne estas amikeco inter ni».

«Aben'», diris Abdul' Saleh', «mi analizis viajn metodojn, kaj mi ŝatas ilin. Plaĉus al mi, ke ni estos amikoj kaj en la estonto, partneroj. Kaj mi deziras komenci amikecon inter ni gastigante vin al la plej grava evento en mia vivo, mia edziĝo. Mi opinias, ke ni iĝos bonaj amikoj, malgraŭ estas multaj aĝjaroj inter ni du».

Tiuj vortoj ŝokis la fraŭlan ermiton, ĉar li ne havis amikojn en la urbo, kaj tio igis lin akcepti la inviton de sia nova amiko.

Abdul' Saleh' proponis, ke Aben' sidiĝu apud lia patro, kaj dum la festumado ekestis bona amikeco inter ili du. La juna fratino de Abdul', Sanj', plaĉis multe al fraŭleĝo, kaj konstatinte tion la edziĝanto, li decidis instrui ŝin pri la detaloj, kiujn li sciis, ke sia nova amiko ŝatas, same kiel pri la Leĝoj Diaj kaj la virtoj, kiujn igos ŝin prudenta, modesta kaj kormola.

Kiam ĉiuj gastoj jam estis for, tri tagojn post kunveni por diri la koncertajn, ritualajn vortojn, kaj esti benataj de la imamo, la nova paro alfrontis la superan momenton.

«Edzino», li diris, «iru al nia ĉambro kaj aranĝu ĉion por via edzo, dum mi ĉi tie preĝas al Dio, por ke Li lumigu min je la momento plej grava en niaj vivoj».

Ŝi kisis lian manon, klinis antaŭ sia novedzo, kaj iris al tiu ĉambro, kiun ŝi kunhavas al li dum la cetera parto de sia vivo.

Kiam Abdul' Saleh' venis en la ĉambron, li trovis sian edzinon en la lito, sed ankoraŭ en ŝiaj vestoj.

«Virino, kion vi faras en viaj vestoj?»

«Edzo, oni neniam vidis min nuda. Mi hontegas».

«Rejin', mia dolĉa edzino», diris Abdul' Saleh' per rompata voĉo, sed mola kaj karesema, «mi..., mi estas via edzo. Antaŭ mi vi neniam sentos honton, ĉar vi kaj mi estas nur ununura karno kaj ununura sango. Kaj ni devos generi bonajn gefilojn de Dio. Ne sentu honton pro via edzo, same kiel via mammo ne sentas ĝin pro mano via».

«Jes, edzo. Mi jam scias, ke vi estas mia posedanto. Sed honto venkas min».

«Venu», diris li ekĵetante la koverton kaj litotukon. Li starigis ŝin kaj kisis ŝin longe kaj tenere. Li karesis ŝian vizaĝon kaj ŝian dorson, kaj antaŭ ŝi notis, li karesis ŝian ventron kaj sekson kaj sukcesis sentigi ŝian korpon. Kaj baldaŭ, sen scii kiam aŭ kiel, ŝi vidis sin tute nuda antaŭ li. Tiam Abdul' Saleh' prenis la litotualon kaj metis ĝin ĉirkaŭ la korpon de Rejin', kaŝante ŝin tute, de la kapo al piedoj. Poste li prenis ŝin sur siajn brakojn kaj kuŝigis ŝin sur la lito. Poste li nudiĝis tute kaj malfermis ŝian tualon.

«Saluton, fremdulino», li diris kun rideto. «Mi volas koni vin».

Ŝi brakumis lin kaj li prenis ŝin. Li estis laŭgrada, pacienca, kaj karesis ŝin tutkorpen, tiel ke ŝi ne multe sentis doloron, ĉar ĝin li tinkturis per plezuro. Ankoraŭ li prenis ŝin tri foje plu laŭ la nokto, kaj ĉiun fojon ŝi spertis orgasmon, kiun ŝi ne kriis, same kiel Zorajd' faris, sed ŝi ploris.

Kaj Abdul' Saleh' komencis okupiĝi pri la negocoj, kiujn sia patro faris antaŭe, ĉar li diris, ke li estas tro maljuna por tio. Dum unu el tiuj vojaĝoj, ekfalinte en sablŝtormon meze de la dezerto, dum karavananoj sidiĝas sur la grundo ene de la cirklo, kiun kameloj formas protekti homojn, li aŭdis konatan voĉon:

«Multe influis en vian personecon pia Zorajd', nobla Abdul' Saleh'».

«Ho, pia Pro El Fu! Dankon pro vizito via. Al kio devas mi la honoron?»

«Ĉu vi ankoraŭ opinias, ke Rejin' pli bone estu mortinta?»

«Ho, ne, Pro El Fu! Ŝi estas virta virino, kiu esperas doni filon al mi post kelkaj monatoj».

«Nu, tio povas atendi, Abdul' Saleh', ĉar bela Zorajd' ankoraŭ havas taskojn fari».

Kaj Abdul' Saleh' eksentis dormemon, kaj nokto regis liajn okulojn kaj animo. Kaj li vekiĝis kun kanto de koko, apud lia edzo, la riĉa Aben' Abdala'. Ŝi memoris, ke kelkajn jarojn antaŭe ŝi lasis lin ĉe Sankta Imamo Omar' por paroli kun Pro El Fu, kaj ke post tio li konsilintis ilin pri ilia filino Fatima, kiun ili edzinigis al bona homo, kiu agas bone al ŝi kaj faris al ili plenpleno da genepoj, ŝiaj gefiloj.

«Edzo», ŝi diris al sia viro, kiu ankoraŭ doremas apud ŝi,

«atendu, mi portos matenmanĝon por vi».

Ŝi portis al li lakton kaj porigĝon, kaj nudiĝinte, ŝi amis lin por plibonigi lian ektagon. Tridek jarojn ili jam geedziĝis, kaj ŝi donis al li tri gefilojn, kaj ankoraŭ ŝi portas kvaran en sia sino. Sed tio ne malebligis, ke ŝi ankoraŭ donas al sia edzo tion, kion neniu alia virino povas doni al li, eĉ la plej profesiaj amantinoj.

Tri monatojn poste ŝi naskis filinon, kiun ili nomigis Sanj', same kiel la fratino de Abdul' Saleh', kiun neniu konas.

Tempo pasas rapide en feliĉa hejmo, kaj kiam Aben' jam okdekjariĝis kelke da tempo, li mortis. Ŝi omaĝis lin eĉ la antaŭan tagon. Je sunleviĝo li fartis ne tre bone, kaj ŝi helpis lin kun zorgo de bona edzino. Ŝi venigis la doktoron, kiu diris, ke la koro de la maljunulo jam atingis la finon de sia vojaĝo. Kaj je la mezo de la vespero li mortis sur la brakoj de sia bona edzino dum ŝi diris al li fragmentojn de La Libro Sankta, kiun ŝi parkeris, por prepari lin vivi en la kampoj de la Paradizo kune kun bona Dio kaj tiuj bonuloj, kiuj mortis antaŭ li.

«Dankon, Zorajd'», li diris kvazaŭ adiaŭo. «Vi estis bona edzino. Dio benu vin..., Dio benas vin». Kaj tion dirite, li mortis.

Zorajd' jam sesdekjariĝis, kaj pasigis la du trionojn de sia vivo kune kun tiu bona homo. Kaj ŝi ploris. Ploris ŝi sincere kaj amare dum horoj. Finfine lia unua filo, Ali', aranĝis la funebbron de sia patro, kiu estis entombigita en la cimiterion urban.

Dum ĉiuj iris hejmen, kiam restas nur ŝi kaj Ali' en la cimiterio kun siaj preĝoj, entombigisto venis al ili:

«Sinjorino, mi devas fermi la lokon. Bonvolu, sekvu min».

Dum Ali' elliris, ŝi parolas al tombigisto pri la zorgado de la tombo de sia edzo.

«Multe vi ploris vian edzon, sinjorino. Mi opinias, ke via edukado jam finas, kaj ni povas finfine lasi sola junan Abdul' Saleh'», diris la homon malantaŭ ridetegon.

«¡Pro El Fu!»

«Jes, sinjoro. Mi opinias, ke nun vi estas pli kompatema ol pia. Nun vi estas pli proksima al Dio. Mi opinias, ke vi vidos min nur unu foje pli, eble du».

Vento blovas, kaj sablo kovras la cimiterion iom post iom.

Daŭrigota

Ĉapitro 49^a

En la daŭro de kelke da monatoj, en kiuj Ramzes plenumis la devojn de vic-reĝo en Malsupra Egipto, lia sankta patro pli kaj pli malsaniĝis. Kaj proksimiĝis la momento, en kiu la sinjoro de la eterneco, vekanta la ĝojon en la koroj, la monarĥo de Egipto kaj de ĉiuj landoj, kiujn lumigas la suno, estis okuponta lokon inter siaj respektindaj antaŭuloj, en la tebaj katakomboj, kiuj kuŝas trans la urbo Teboj.

La potenculo, kiu disdonis vivon al la regnanoj kaj havis la rajton forpreni de la edzoj iliajn edzinojn, ne estis ankoraŭ tre maljuna. Sed la tridekjara regado tiel lacigis lin, ke li mem jam ekdeziris ripozi, retrovi siajn junecon kaj belecon, en la okcidenta lando, kie ĉiu faraono, sen ĉagrenoj, regas eterne popolojn tiel feliĉajn, ke neniu, neniam volis reveni de tie.

Ankoraŭ antaŭ duono da jaro la sankta estro mem plenumis ĉiujn devojn de sia reĝa posteno, sur kiu estis bazita la sendanĝero kaj feliĉo de la tuta videbla mondo.

Matene, tuj post la unua kanto de la koko, ĉiutage la pastroj vekis la monarĥon per himno, honoranta la leviĝantan sunon. La faraono tiam leviĝis de la lito kaj banis sin en ora ujo. Poste oni frotis lian korpon per oleoj sen prezo, murmurante preĝojn, kiuj havis la econ forpeladi la malbonajn spiritojn.

Tiamaniere purigita kaj incensita, li iris en malgrandan kapelon, forŝiris de la pordo la argilan sigelon kaj eniris sola en la sanktejon, kie sur ebura lito ripozis la mirakla statuo de la dio Oziriso. La dio posedis eksterordinaran econ: ĉiunokte defalis liaj kruroj, brakoj kaj kapo, fortranĉitaj iam de la malbona dio Set; sed post la preĝo de l' faraono ĉiuj membroj ree kunkreskis, sen ies helpo.

Kiam lia sankteco konvinkiĝis, ke

Oziriso ree estas sendifekta, li tiris la statuon el la lito, banis ĝin, surmetis al ĝi multekostajn vestojn kaj sidiginte ĝin sur malakitan tronon, incensis ĝin per parfumoj. Tio estis tre grava ceremonio: se iam ajn matene la membroj de Oziriso ne estu kunkreskintaj, tio estus signo, ke granda danĝero minacas Egipton, se ne la tutan mondon.

Reviviginte kaj vestinte la dion, lia sankteco lasis la pordon de la kapelo malfermita, por ke tra ĝi fluu benoj sur la tutan landon. Samtempe li destinis pastrojn, kiu dum la tuta tago devis gardi la sanktejon, ne tiom de malbona volo de homoj, kiom de ilia malseriozeeco. Ofte okazis, ke senpripensa mortemulo, tro proksimiĝinte al la plej sankta loko, ricevis nevideblan baton, kiu senigis lin je la konscio, eĉ je la vivo.

Post la diservo, la sinjoro, ĉirkaŭita de kantantaj pastroj iris en la grandan manĝoĉambron, kie staris por li apogseĝo kaj malgranda tablo, kaj dek naŭ aliaj tabloj antaŭ dek naŭ statuoj, prezentantaj la dek naŭ antaŭajn dinastiojn. Kiam la monarĥo sidiĝis, enkuris junaj knaboj kaj knabinoj kun oraj teleroj, sur kiuj estis viando kaj kukoj, kaj kun kruĉoj da vino. La pastro, zorganta pri la manĝaĵoj, gustumis de la unua telero kaj kruĉo, kiujn oni poste surgenuis donis al la faraono; la aliajn telerojn kaj kruĉojn oni metis antaŭ la statuoj de l' antaŭuloj. Kiam la monarĥo, kvietiginte la malsaton, forlasis la salonon, la manĝaĵojn, destinitajn por la antaŭuloj, havis la rajton manĝi la princoj kaj pastroj.

El la manĝoĉambro la sinjoro transiris en la aŭdiencan salonon, ne malpli grandan. Tie falis antaŭ li sur la vizaĝon la plej altaj ŝtataj oficistoj kaj la plej proksima familio; poste la ministro Herhor, la plej alta trezoristo, la plej alta juĝisto kaj la plej alta estro de la polico prezentis al li raportojn pri la ŝtataj aferoj. La legado estis interrompata per

religiaj muziko kaj danco, dum kiuj oni superŝutis la tronon per kronoj kaj bukedoj.

Post la aŭdienco, lia sankteco transiris en flankan kabineton por iom dormeti. Poste li faris oferojn al la dioj, el vino kaj incenso, kaj rakontis al la pastroj siajn sonĝojn, laŭ kiuj la saĝuloj redaktis la plej altajn ordonojn en la aferoj, kiujn devis decidi lia sankteco.

Sed iafoje, kiam li ne havis sonĝojn, aŭ kiam la klarigoj ne ŝajnis al la faraono ĝustaj, lia sankteco ridetis bonkore kaj ordonis agi en la afero tiel aŭ alie. La ordono estis leĝo, kiun neniu povis ŝanĝi, eble nur en la plenumo de la detaloj.

En la posttagmezaj horoj lia sankteco, portata en portilo, sin montris en la korto al sia fidela gvardio, kaj poste suriris terason kaj rigardis al la kvar partoj de l' tero, por sendi al ili sian benon. Tiam sur la supro de l' pilonoj oni pendigis flagojn, kaj sonis potencaj trumpetoj. Kiu ajn aŭdis ilin, en la urbo aŭ sur la kampo, Egiptano aŭ barbaro, falis sur la vizaĝon, por ke ankaŭ sur lian kapon fluu parteto de la plej alta favoro.

En tia momento ne estis permesite bati homon, nek beston: la bastono levita super la dorso, mem malleviĝis. Se krimulo, kondamnita al la morto, sukcesis pruvi, ke oni legis al li la verdikton en la momento de l' apero de la sinjoro de la ĉielo kaj tero, oni malgrandigis lian punon. Ĉar antaŭ la faraono paŝas la forto, kaj post li la pardono.

Feliĉiginte tiel sian popolon, la estro de ĉio, kio ajn estas sub la suno promenis en siaj ĝardenoj, inter palmoj kaj sovaĝaj figuoj; tie li restis plej longe, tie honoris lin liaj virinoj, kaj ludis antaŭ li la infanoj de lia domo. Se iu el ili per sia beleco aŭ lerteco altiris lian atenton, li vokis ĝin al si kaj demandis:

- Kiu vi estas, mia malgranda?
- Mi estas la princo Binotris, filo de lia sankteco — respondis la knabo.

— Kaj kiel oni nomas vian patrinon?

— Mia patrino estas la sinjorino Amesos, virino de lia sankteco.

— Kion vi scias?

— Mi jam scias kalkuli ĝis dek kaj skribi: "Vivu eterne nia patro kaj dio, la sankta faraono Ramzes!..."

La sinjoro de la eterneco bonkore ridetis kaj per sia delikata, preskaŭ diafana mano tuŝetis la frizitan kapon de la brava knabo. Tiam la infano reale fariĝis princo, kvankam lia sankteco daŭrigis enigme rideti.

Sed tiu, kiun unu fojon tuŝis la dia mano, ne povis renkonti malsukceson en la vivo kaj devis esti levita super la aliajn.

Por tagmanĝi, lia sankteco iris en alian manĝoĉambron kaj dividis sian nutraĵon kun la dioj de ĉiuj nomoj de Egipto, kies statuoj staris apud la muroj. Kion ne manĝis la dioj, tion ricevis la pastroj kaj altranguloj de l' kortego.

Antaŭ la vespero lia sankteco akceptis la viziton de la reĝino Nikotris, la patrino de l' kronprinco, rigardis religiajn dancojn kaj aŭskultis koncerton. Poste li ree iris sin bani, kaj purigita penetris en la kapelon de Oziriso, por senvestigi kaj kuŝigi en la liton la miraklan dion. Farinte tion, li sigelis la pordon de la kapelo kaj ĉirkaŭita de pastra procesio, iris en sian dormoĉambron.

La pastroj ĝis la leviĝo de l' suno en apuda ĉambro mallaŭte preĝis al la animo de l' faraono, kiu dum la dormo estas inter la dioj. Tiam ili prezentis al ĝi petojn pri sukcesa plenumo de kurantaj ŝtataj aferoj, pri protekto de la limoj de Egipto kaj de la reĝaj tomboj, por ke neniu ŝtelisto kuraĝu eniri tien kaj interrompi la eternan ripozon de la glorplenaj potenculoj. Sed la pastraj preĝoj, verŝajne de la nokta laciĝo, ne ĉiam estis efikaj: la embarasoj de la ŝtato kreskis, kaj oni ŝtelis en la sanktaj tomboj ne nur multekostajn objektojn, sed eĉ mumojn de l' faraonoj.

Tio estis la rezultato de la gastado en la lando de diversaj fremduloj kaj idolistoj, de kiuj la popolo lernis malŝati la egiptajn diojn kaj plej sanktajn lokojn.

La ripozo de la sinjoro de l' sinjoroj estis interrompata unu fojon, noktomeze. En ĉi tiu horo la astrologoj vekis lian sanktecon kaj konigis al li, en kiu fazo estas la luno, kiuj planedoj brilas super la horizonto, kiu stelaro trapasas la meridianon kaj entute ĉu ne okazis io eksterordinara. Ĉar iafoje aperis nuboj, la steloj falis pli multenombre ol ordinare, aŭ transflugis super la tero fajraj globoj.

La sinjoro aŭskultis la raporton de l' astrologoj, en okazo de ia eksterordinara fenomeno trankviligis ilin pri la sendanĝereco de la mondo kaj ordonis noti ĉiujn observojn en specialaj tabeloj, kiujn oni ĉiumonate sendis al la pastroj de l' templo de Sfinkso, la plej grandaj saĝuloj, kiujn posedis Egipto. Ili faris konkludojn el la tabeloj, sed la plej gravajn ili komunikis al neniuj, eble nur al siaj haldeaj kolegoj en Babilono.

Post la noktomezo la faraono jam povis dormi ĝis la matena kanto de l' kokoj, se li deziris.

Tiel pian kaj laboreman vivon, ankoraŭ antaŭ duono da jaro vivis la bona dio, disdonanto de la protekto, vivo kaj sano, tage kaj nokte gardanta la teron kaj ĉielon, la videblan kaj nevideblan mondon. Sed de duono da jaro, la eterne vivanta lia animo pli kaj pli ofte estis laca de la teraj aferoj kaj de sia korpa ŝelo. Estis tagoj, en kiuj li manĝis nenion, kaj noktoj, en kiuj li tute ne dormis. Ifoje dum la aŭdienco sur lia kvieta vizaĝo aperis signoj de profunda doloro, tre ofte, pli kaj pli ofte li svenis.

La reĝino Nikotris terurita, la nobla Herhor kaj pastroj multfoje demandis la estron, kio estas al li. Sed la sinjoro levis la ŝultrojn kaj silentis, ĉiam plenumante siajn lacigajn devojn.

Tiam la kortegaj kuracistoj komencis nerimarkeble doni al li la plej fortajn rimedojn por refortigi lin. Oni miksis al lia vino cindron de ĉevalo kaj bovo, poste de leono, rinocero kaj elefanto; sed la potencaj rimedoj havis nenian efikon. Lia sankteco tiel ofte svenis, ke oni ĉesis legi al li la raportojn.

Unu tagon Herhor kun la reĝino kaj pastroj petegis la sinjoron, ke li permesu esplori sian dian korpon. La sinjoro konsentis, la kuracistoj aŭskultis lin kaj palpis, sed ekster granda malgrasiĝo trovis neniun danĝeran simpton.

—Kion sentas via sankteco?
—demandis fine la plej saĝa kuracisto.

La faraono ekridetis.

—Mi sentas —respondis li —ke jam estas por mi tempo reveni al mia suna patro.

—Tion via sankteco ne povas fari, sen plej granda malutilo por viaj popoloj —rapide intermetis Herhor.

—Mi lasos al vi mian filon, Ramzeson, kiu estas leono kaj aglo en unu persono —respondis la sinjoro.
—Kaj vere, se vi obeos lin, li preparos al Egipto tian sorton, pri kia oni neniam aŭdis de la komenco de la mondo.

La sankta Herhor kaj aliaj pastroj ekstremis de tia promeso. Ili sciis, ke la kronprinco estas leono kaj aglo en unu persono, kaj ke ili devas lin obei. Sed ili preferus ankoraŭ longajn jarojn havi jen ĉi tiun favoran sinjoron, kies koro, plena de kompato, estis kvazaŭ la norda vento, kiu alportas la pluvon al la kampoj kaj refreŝigas la homojn.

Kaj tial ĉiuj, kvazaŭ unu homo, falis teren kaj ĝemante kuŝis sur la ventroj, ĝis la faraono konsentis sin submeti al kuracado.

Tiam la kuracistoj por tuta tago elportis lin en la ĝardenon, inter bonodorajn pinglajn arbojn, nutris lin per pecetigita viando, donis al li por

trinki fortan buljonon, lakton kaj maljunan vinon. La nutraj rimedoj refortigis lian sanktecon proksimume por unu semajno, sed baldaŭ venis nova malfortiĝo, kaj por venki ĝin oni devigis la sinjoron trinki freŝan sangon de bovidoj, devenantaj de Apiso.

Sed la sango ankaŭ ne por longe helpis, kaj oni devis peti konsilon de la ĉefpastro de la malbona dio Set.

Ĉe ĝenerala timo eniris la malgaja pastro, ekrigardis lian sanktecon kaj konsilis teruran rimedon.

—Oni devas —diris li —doni al la faraono sangon de senkulpaj infanoj, ĉiutage unu pokalon...

La pastroj kaj altranguloj, plenigantaj la ĉambron, mutiĝis post tia konsilo. Poste ili komencis murmureti, ke por tiu celo plej taŭgaj estos la infanoj de l' kamparanoj, ĉar la infanoj de l' pastroj kaj altranguloj perdas la senkulpecon jam en la lulilo.

—Indiferente estas, kies estos la infanoj —respondis la kruela pastro —se nur lia sankteco havos ĉiutage freŝan sangon.

La sinjoro, kuŝante kun fermitaj okuloj sur la lito, aŭskultis la sangon konsilon kaj murmuretojn de la korteganoj. Kaj kiam unu el la kuracistoj malkuraĝe demandis lierhoron, ĉu oni povas sin okupi pri la serĉado de taŭgaj infanoj, la faraono rekonsciiĝis. Li fiksas siajn saĝajn okulojn sur la ĉeestantoj kaj diris:

—La krokodilo ne manĝas siajn infanojn, la ŝakalo kaj hieno donas sian vivon, por savi siajn idojn, kaj mi trinkus la sangon de la egiptaj infanoj, kiuj estas miaj idoj?... Vere, neniam mi supozus, ke iu kuraĝos konsili al mi tiel malnoblan rimedon!...

La pastro de la malbona dio falis sur la vizaĝon, klarigante, ke la infanan sangon neniu ankoraŭ trinkis en Egipto, sed ke la inferaj potencoj povas tiamaniere redoni la sanon. Tia rimedo almenaŭ estas uzata en Fenicio kaj

Asirio.

—Hontu —respondis la faraono —en la palaco de la egiptaj potenculoj paroli pri tiel abomenaj aferoj. Ĉu vi ne scias, ke Fenicianoj kaj Asirianoj estas malsaĝaj barbaroj? Sed ĉe ni eĉ plej malklera kamparano ne kredos, ke maljuste verŝita sango povas esti utila por iu.

Tiel parolis la egala al la senmortaj. La korteganoj kovris la vizaĝojn, ruĝajn de la honto, kaj la ĉefpastro de Set silente eliris el la ĉambro.

Tiam Herhor, por savi la estingiĝantan vivon de la monarĥo, uzis la lastan rimedon kaj diris al la faraono, ke en teba templo sin kaŝas Haldeano, Beroes, la plej saĝa pastro de Babilono kaj potenca miraklisto.

—Por via sankteco —diris Herhor —li estas fremda homo kaj ne havas rajton doni tiel gravajn konsilojn al nia sinjoro. Sed permesu, reĝo, ke li ekrigardu vin, ĉar mi estas certa, ke li trovos rimedon kontraŭ via malsano, kaj en neniu okazo ofendos vian piecon per sendiaj vortoj.

Ankaŭ ĉi tiun fojon la faraono cedis al la deziro de sia fidela servisto. Kaj post du tagoj, alvokita per ia sekreta maniero, venis Memfison Beroes.

La saĝa Haldeano, eĉ ne rigardante detale la faraonon, donis jenan konsilon:

—Oni devas trovi en Egipto homon, kies preĝoj atingas la tronon de la Plej Alta. Kaj kiam li sincere preĝos por la faraono, la monarĥo retrovos la sanon kaj vivos longajn jarojn.

Aŭdinte ĉi tiujn vortojn, la sinjoro ekrigardis la amase ĉirkaŭantajn lin pastrojn kaj diris:

—Mi vidas ĉi tie tiom da sanktaj viroj, ke se iu el ili zorgos pri mi, mi estos sana...

Kaj li ekridetis nerimarkeble.

—Ni ĉiuj estas nur homoj —diris la sankta Beroes —kaj niaj animoj ne

ĉiam povas leviĝi ĝis la piedoj de la Eterna. Sed mi donos al via sankteco fidindan rimedon por trovi la homon, kiu preĝas plej sincere kaj plej efike.

—Bone, trovu lin, por ke li fariĝu mia amiko en la lasta horo de mia vivo.

Post la favora respondo de l' sinjoro, la Ĥaldeano postulis ĉambron de neniu loĝata kaj havanta nur unu pordon. Kaj en la sama tago, unu horon antaŭ la subiro de l' suno, li ordonis transporti tien lian sanktecon.

En la destinita horo kvar plej altaj pastroj vestis la faraonon per nova lina robo, diris super li grandan preĝon, kiu tute certe forpeladis la malbonajn fortojn kaj sidiginte lin en simplan cedran portilon, transportis la sinjoron en la malplenan ĉambron, kie estis nur malgranda tablo.

Tie jam estis Beroes kaj turnita al la oriento preĝis.

Kiam la pastroj eliris, la Ĥaldeano fermis la pezan pordon de la ĉambro, surmetis sur la ŝultrojn purpuran skarpon, kaj sur la tablo antaŭ la faraono metis vitran nigran globon. En la maldekstran manon li prenis akran ponardon el babilona ŝtalo, en la dekstran -- bastonon, kovritan per misteraj signoj, kaj per ĉi tiu bastono desegnis en la aero rondon ĉirkaŭ si kaj la faraono. Poste, turnante sin al unu post la alia al la kvar partoj de l' mondo, li murmuretis:

"Amorul, Taneha, Latisten, Rabur, Adonai... Ekkompatu kaj purigu min, Patro ĉiela, favora kaj kompatema... Verŝu sur la neindan vian serviston la sanktan benon kaj etendu vian ĉiopovan brakon kontraŭ la spiritoj obstinaj kaj ribelaj, por ke mi povu trankvile konsideri viajn sanktajn verkojn..."

Li interrompis kaj sin turnis al la faraono:

—Mer-amen-Ramzes, ĉefpastro de Amon, ĉu en la nigra globo vi

rimarkas fajron?

—Mi vidas blankan fajron, kiu ŝajnas moviĝi, kiel abelo super floro...

—Mer-amen-Ramzes, rigardu la fajron kaj ne deturnu de ĝi viajn okulojn... Rigardu nek dekstren, nek maldekstren, nenien, kio ajn aperus de la flankoj...

Kaj ree li murmuretis:

"Baralanensis, Baldaĥiensis, per la potencaj princoj Genio, Laĥidae, ministroj de la infera regno, mi alvokas vin per la forto de la plej alta majesto, kiu estas verŝita sur min, mi ĵure petas kaj ordonas..."

En tiu momento la faraono skuiĝis de abomeno.

—Mer-amen-Ramzes, kion vi vidas? —demandis la Ĥaldeano.

—El post la globo elrigardas ia terura kapo... ĝiaj flavruĝaj haroj stariĝas rekte, ĝia vizaĝo estas verda... la pupiloj estas turnitaj malsupren, oni vidas nur la blankon de la okuloj... la buŝo estas larĝe malfermita, kvazaŭ por krei.

—Tio estas la Teruro —diris Beroes kaj turnis super la globon la pinton de la ponardo.

Subite la faraono sin fleksis ĝis la tero.

—Sufiĉe!... —ekkriis li —kial vi tiel turmentas min?... La laca korpo volas ripozi, la animo —flugi en la landon de la eterna lumo... Kaj vi ne nur ne permesas al mi morti, sed eĉ elpensas novajn turmentojn... Ah!... mi ne volas...

—Kion vi vidas?

—De la plafono ĉiumomente malleviĝas kvazaŭ du araneaj piedoj, teruraj... Dikaj kiel palmoj, kovritaj de haroj, kun hokoj ĉe la fino... Mi sentas, ke super mia kapo flugpendas grandega araneo kaj teksas ĉirkaŭ mi retojn el ŝipaj ŝnuregoj...

Beroes turnis la ponardon supren.

—Mer-amen-Ramzes —diris li
—senĉese rigardu la fajron kaj ne
turnu la okulojn flanken...

"Jen estas la signo, kiun mi levas en
via ĉeesto —murmuretis li. —Jen mi
estas potence armita per la dia helpo,
mi antaŭvidanta kaj sentima, kiu ĵure
elvokas vin... Aye, Saraye, Aye,
Saraye... per la nomo de la potenco kaj
eterne vivanta Dio..."

En ĉi tiu momento sur la vizaĝo de l'
faraono aperis kvieta rideto.

—Ŝajnas al mi —diris la sinjoro —ke mi
vidas Egipton... la tutan Egipton...
Jes, tio estas Nilo, la dezerto... Ĉi tie
Memfiso, tie Teboj...

Efektive, li vidis Egipton, la tutan
Egipton, sed ne pli grandan, ol la aleo
de lia palaco ĝardeno. La stranga bildo
havis tamen la econ, ke se la faraono
pli atente rigardis iun punkton, la punkto
pligrandiĝis preskaŭ ĝis natura
grandeco.

La suno estis subiranta, verŝante sur
la teron ore-purpuran lumon. La tagaj
birdoj prepariĝis al la dormo, la noktaj
vekiĝis en la kaŝejoj. En la dezerto
oscedis la hienoj kaj ŝakaloj, kaj la
dormetanta leono streĉis siajn
potencajn membrojn, sin preparante
persekuti la akiron.

La nila fiŝisto rapide eltiris la retojn, la
grandaj transportaj ŝipoj albordiĝis. La
laca kamparano deprenis de la gruo la
sitelon, per kiu la tutan tagon li ĉerpis la
akvon. En la urboj oni ekbruligis la
lumojn, en la temploj la pastroj
kolektiĝis por la vesperaj preĝoj. Sur la
vojoj malleviĝis la polvo, kaj eksilentis la
grinco de la veturilaj radoj. De la supro
de l' pilonoj eksonis ĝemaj voĉoj,
alvokantaj la popolon al preĝo.

Post momento la faraono rimarkis
kun miro kvazaŭ aron da arĝentaj
birdoj, flugpendantaj super la tero. Ili
elflugis el la temploj, palacoj, fabrikoj,
ŝipoj, kamparaj domoj, eĉ el la minejoj.
Komence ĉiu el ili rapidis supren kiel
sago; sed tuj ĝi renkontis sub la ĉielo

alian arĝente-flugilan birdon, kiu baris al
li la vojon, batis ĝin per ĉiuj fortoj, kaj
ambaŭ senvivaj falis teren.

Tio estis la nekonsentaj homaj
preĝoj, kiuj malhelpis unu alian leviĝi
ĝis la trono de la Eterna...

La faraono atente aŭskultis...
Komence atingis lin nur la murmuro de
l' flugiloj; sed baldaŭ li jam povis distingi
la vortojn.

Kaj li aŭdis malsanulon, kiu preĝis pri
la resaniĝo, kaj samtempe kuraciston,
kiu petegis, ke la paciento plej longe
estu malsana. Mastro petis Amonon, ke
li gardu lian grenejon kaj stalon; ŝtelisto
etendis la manojn al la ĉielo, por ke li
povu sen malhelpo elkonduki
malpropran bovinon kaj plenigi sakojn
per malpropra greno. Iliaj preĝoj tuŝegis
unuj aliajn, kiel ŝtonoj senditaj per ĵetilo.

Migranto en la dezerto falis sur la
sablon, petegante la nordan venton, ke
ĝi alportu al li akvan guton; maristo
batis la ferdekon per la frunto, por ke la
orientaj ventoj blovu ankoraŭ unu
semajnon. Kamparano volis, ke plej
rapide sekiĝu la kotujoj post la
superakvo; malriĉa fiŝisto postulis, ke la
kotujoj sekiĝu neniam.

Iliaj preĝoj rompis unu alian kaj ne
atingis la diajn orelojn de Amon.

La plej granda bruo regis super la
ŝtonminejoj, kie la krimuloj, ligitaj per
ĉenoj, krevigis grandajn ŝtonegojn per
kajnoj, trempitaj en akvo. Tie la taga
grupo de la laboristoj petegis pri la
nokto, por iri dormi; la laboristoj de la
nokta grupo, vekataj de la gardistoj,
batis siajn brustojn, petegante, ke
neniam subiru la suno. Tie komercistoj
aĉetantaj la tranĉitajn kaj kvadratigitajn
ŝtonojn, preĝis, ke en la minejoj estu
plej granda nombro da krimuloj, kaj la
liveristoj de nutraĵo kuŝis sur la ventroj,
sopirante, ke epidemio pereigu
laboristojn kaj ebligu al la liveristoj pli
grandan profiton.

La preĝoj de tiuj, kiuj estis en la

minejoj ankaŭ ne atingis la ĉielon.

Sur la okcidenta limo la faraono ekvidis du armeojn, sin preparantajn al la batalo. Ambaŭ kuŝis sur la sablo, petegante Amonon, ke li ekstermu la malamikon. Libianoj deziris honton kaj morton al Egiptanoj; Egiptanoj ĵetis malbenojn sur Libianojn.

La preĝoj de unuj kaj de aliaj, kvazaŭ du akcipitraj aroj, interbatalis super la tero kaj falis sur la dezerton. Amon eĉ ne rimarkis ilin.

Kaj kien ajn la faraono turnis sian lacan pupilon, ĉie li vidis la samon. La kamparanoj preĝis pri la ripozo kaj pri malgrandigo de l' impostoj; la skribistoj -- ke kresku la impostoj kaj neniam finiĝu la laboro. La pastroj petis Amonon pri longa vivo por Ramzes XII-a kaj pri ekstermo de Fenicianoj, kiuj malbonigis al ili la financajn operaciojn; la nomarĥoj alvokis la dion, por ke li konservu Fenicianojn kaj plej baldaŭ permesu suriri la tronon al Ramzes XIII-a, ĉar li metos bridon sur la absolutismon de l' pastroj. La leonoj, ŝakaloj kaj hienoj spiregis de malsato kaj de dezirego de freŝa sango; la cervoj, kapreoloj kaj leporoj kun timo forlasis la kaŝejojn, songante konservi sian mizeran vivon ankoraŭ unu tagon. La sperto tamen diris al ili, ke ankaŭ en ĉi tiu nokto devas pereji dekelko, por ke ne mortu la rabuloj.

Kaj tiel en la tuta mondo regis malpaco. Ĉiu deziris tion, kio plenigis aliajn per timo; ĉiu petis pri propra feliĉo, ne demandante sin, ĉu li ne malutilos al la proksimulo.

Tial iliaj preĝoj, kvankam ili similis arĝentajn birdojn, flugantajn al la ĉielo, ne atingis la celon. Kaj la dia Amon, al kiu leviĝis neniu voĉo de la tero, apoginte la manojn sur la genuoj, pli kaj pli profundigis en la konsiderado de l' propra dieco, kaj sur la tero pli kaj pli ofte regis la blinda forto kaj hazardo.

Subite la faraono ekaŭdis virinan voĉon.

—Petolulo!... petolĉjo!... revenu hejmen, jam tempo estas preĝi.

—Tuj... tuj!... —respondis infana voĉo.

La monarĥo ekrigardis tien kaj ekvidis mizeran terdomon de skribisto, gardanta brutojn. La posedanto, ĉe la brilo de la subiranta suno, skribis sian registron, lia edzino pistis per ŝtono tritikon por plata kuko, kaj antaŭ la domo, kvazaŭ juna kaprido, kuris kaj saltis sesjara knabo, ridante oni ne scias de kio.

Sendube ebriigis lin la odorplena vespera aero.

—Petolulo!... —tuj venu preĝi!... —ripetis la virino.

—Tuj!... Tuj!...

Kaj ree li kuris kaj ĝojis kiel freneza.

Fine la patrino, vidante, ke la suno komencas droni en la sabloj de la dezerto, metis flanken la ŝtonon kaj elirinte en la korton, kaptis la kurantan knabon, kiel ĉevalidon. Li kontraŭstaris, sed fine cedis al la superforto. La patrino, entirinte lin en la terdomon, tuj sidigis lin sur la planko kaj tenis per la mano, por ke li ne forkuru.

—Ne moviĝu —diris ŝi —krucu la krurojn kaj sidu rekte, la manojn kunmetu kaj levu al la ĉielo... Ah, malbona infano!...

La knabo sciis, ke li ne evitos la preĝon; do por plej baldaŭ ree elkuri en la korton, li pie turnis la okulojn kaj la manojn al la ĉielo kaj per mallaŭta kaj kriema voĉo preĝis, senspire:

—Mi dankas vin, bona dio Amon, ke vi gardis hodiaŭ la paĉjon de malfeliĉaj okazoj, kaj al la panjo donis tritikon por la plataj kukoj... Kaj kio ankoraŭ?... Ke vi kreis la ĉielon kaj teron kaj sendis al ĝi Nilon, kiu alportas al ni la panon... Kaj kio ankoraŭ?... Ah, mi jam

scias!... Mi dankas al vi, ke tiel bele estas ekstere, ke kreskas floroj, kantas birdoj kaj palmoj naskas dolĉajn daktilojn. Kaj pro ĉio bona, kion vi donacis al ni, ĉiuj amu vin kiel mi kaj laŭdu pli bone ol mi, ĉar mi estas ankoraŭ malgranda kaj oni ne instruis al mi la saĝon. Jam sufiĉe...

—Malbona infano! —murmuris la skribisto, klinita super sia registro.
—Malbona infano, vi malzorge honoras Amonon...

Sed la faraono en la mirakla globo rimarkis ion tute alian. La preĝo de la petolanta knabo, kiel alaŭdo leviĝis al la ĉielo kaj flirtante per la flugiloj, rapidis pli kaj pli alten; ĝis la trono, kie la eterna Amon, kun la manoj sur la genuoj, dronis en la konsiderado de l' propra ĉiopoveco.

Poste ĝi leviĝis ankoraŭ pli alten, ĝis la kapo de l' dio kaj kantis al li per infana voĉo:

—Kaj pro ĉio bona, kion vi donacis al ni, ĉiuj amu vin, kiel mi...

Ĉe ĉi tiuj vortoj, la dio dronanta en si mem malfermis la okulojn, kaj falis el ili sur la mondon radio de la feliĉo. De la tero ĝis la ĉielo ekregis senlima silento. Ĉiu doloro, ĉiu timo, ĉiu maljustaĵo ĉesis. La siblanta sago ekpendis en la aero, la leono haltis en sia salto sur la cervinon, la levita bastono ne falis sur la dorson de l' sklavo. La malsanulo forgesis pri la sufero, la erarvaganta en la dezerto --pri la malsato, la malliberulo pri la ĉenoj. Kvietiĝis la ventego kaj haltis la ondo, preta dronigi la ŝipon. Kaj sur la tuta tero ekregis tia trankvilo, ke la suno jam kaŝita trans la horizonto, ree levis sian radiantan kapon...

La faraono rekonsciĝis. Li ekvidis antaŭ si la malgrandan tablon, sur ĝi la nigran globon, kaj apude la Ĥaldeanon Beroeson.

—Mer-amen-Ramzes —demandis la pastro —ĉu vi trovis la homon, kies

preĝoj atingos la piedojn de la Eterna?

—Jes —respondis la faraono.

—Ĉu li estas princo, kavaliro, profeto, aŭ eble simpla ermito?


—Tio estas malgranda, sesjara knabo, kiu nenion petis de Amon, sed dankis pro ĉio.

—Ĉu vi scias, kie li loĝas?

—Mi scias —respondis la faraono —sed mi ne volas ŝteli por mi la potencon de liaj preĝoj. La mondo, Beroes, estas grandega akvoturno, en kiu la homoj estas ĵetataj, kiel sablo, kaj ĵetas ilin la malfeliĉo. Kaj la infano donas al la homoj tion, kion ili ne povus doni: mallongan momenton de forgeso kaj trankvilo. La forgeson kaj la trankvilon... ĉu vi komprenas tion, Ĥaldeano?

Beroes silentis.

Daŭrigota





Kajeroj el la Suda

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels100.pdf>

Esperanto en la Universitato Distanca!

Laŭ informo en retejo de HEF, komencos baldaŭ kurso universitata por gajni diplomon A2. La kurso kostas €230, kaj la respondeculo estas profesoro Manvel Pankorbo, el Madrido. Ankaŭ eblas fari nur la ekzamenon, kaj la kosto estas pli malmultekosta.

Mi konsilas esperantistojn eniri la kurson, se eblas, kaj se ne almenaŭ fari la ekzamenon. Finfine ni havas oficialan agnoskon en nia lando, krom la kursoj, kiujn instruis D-ro Régulo Pérez en La Laguna Universitato, Kanariaj Insuloj, antaŭ 40 jaroj, kies lernanto mi havis la honoron esti.

Oni trovos la koncernan informon ĉe:

<http://www.esperanto.es/hef/index.php>

ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88